Raporto de la jaro 2020
Genova Esperanto-Klubo

VARBADO

Septembre 2019 diversaj artikoloj pri E-kursoj estis publikigitaj en la jenaj retejoj:

www.bacheca.it
www.kijiji.it
www.vivastreet.it

KURSOJ

Novembre 2019 startis kurso je niveloj B1/B2 kun 4 partoprenantoj kaj finiĝis anticipe fine de februaro pro la pandemio.

KULTURAJ EVENTOJ

Festivalo **"Parole Spalancate"** Ĝenovo, de la 5-a ĝis la 6-a de septembro 2020

Loko: Ĝenovo, Duka Palaco.

Partoprenantoj: Tiberio Madonna (poeto), Anna Carrera (librotablo), Cristina Balzarini (organizado).

Vendredon vespere alvenis Tiberio Madonna el Caserta kaj Anna Carrera el Biella. Cristina Balzarini atendis ilin ĉe la ĉefa stacidomo (Genova P. Principe) kaj akompanis ilin al la hotelo (Minihotel – Via Lomellini, 7) situanta en la urbocentro. La duopo gastis tie dum 3 noktoj. Sabaton posttagmeze (15h-20h) la grupo starigis la tablon por vendi la librojn kaj disdoni materialon pri Esperanto. Je la 16.30, dum duonhoro, Tiberio Madonna legis kaj analizis siajn poemojn (Gutoj da klorofilo) al la publiko. En la salono ĉeestis dekoj da homoj: inter ili estis esperantistoj de la tigulia grupo (GET) kaj kelkaj lernantoj de la ĝenova grupo (GEK). Dimanĉon posttagmeze (15h-20h) Anna Carrera kaj Cristina Balzarini daŭre okupiĝis pri librovendado kaj pri la disdono de esperanta materialo (broŝuroj ktp). Lundon matene, Anna Carrera kaj Tibero Madonna forlasis Ĝenovon kaj hejmeniris. Dum la semajnfino, ili ne nur okupiĝis pri la evento, sed ili povis viziti la urbon kaj la marbordajn vilaĝetojn. Cristina montris la belaĵojn de la provinco kaj gustumigis al ili lokajn specialaĵojn ĉe restoracioj. La etoso estis bonega kaj la sperto tre valora por ĉiuj! Du ĉeestantoj jam kontaktis la ĝenovan grupon por partopreni kursojn okaze de la venonta sesio.

Genova Esperanto-Klubo
Ĝenovo, la 7-an de Februaro 2021

Patrick Morando